

Pri la svisa neŭtraleco, II.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.12.19 & 21

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

La pasintan semajnon ni konstatis, ke la sukceso de la Ligo inter la tri civitoj Uri, Schwyz kaj Nidwald rezultas el la decido, ke okaze de konflikto inter du el tiuj tri ŝtatoj, la tria devos interveni kiel arbitracianto por repacigi la du aliajn. Ilia alianco signifis fakte cedon de parto de la propra suvereneco profite al la Ligo.

A.- La kaŭzo de ilia alianco estis la emo emancipiĝi el la arbitracia rolo de la feŭda mastro, la familio de Habsburg. Estas tute normale, ke la reganta duka familio de Habsburg celis rekonkeri sian plenan feŭdan povon super la Gotardaj civitoj Uri, Schwyz kaj Nidwald. Tial en 1315 la dukoj Frederiko kaj Leopoldo de Habsburg decidis interveni kun la apogo de ĉiuj nobeloj de la najbaraj landoj. Dum unu el la dukoj atakis la civiton Schwyz, la alia sin direktis kontraŭ Nidwald.

Cl.- La rezulto estis la fama batalo de Morgarten, speco de mezepoka Dien-Bien-Fu, kiu anoncis la finon de la kavaliraj militoj. La duka armeo estis ĵetita en la lagon Aegeri fare de la Schwyz'aj kamparanoj, kiuj luktis per neklasikaj armiloj, tio estas per hakiloj, forkegoj, falĉiloj, per ĵetado de ŝtonoj laŭ la hornusa metodo kaj per la faligo de trunkoj kaj rokoj, kiujn ili lavangigis sur la dukan armeon. Per tiuj nekutimaj rimedoj ili defendis la rajton neagnoksi la koncernan feŭdan povon.

A.- En la kamparanaj komunumoj de tuta Eŭropo oni raportis pri ĉi tiu evento. Same post Dien-Bien-Fu en la moderna mondo, ĉiuj koloniaj landoj fieris pri la venko de la vietnamoj kontraŭ la armeo franca. Tiam spirite finiĝis la kolonia periodo, eĉ por la soveta imperio, kiu helpis al la vietnamoj.

Cl.- Por reveni al niaj Schwyz'anoj de la 14-a jarcento ni diru, ke la flago kaj la nomo de Schwyz iĝis por la eksteruloj la flago kaj la nomo de la Ligo mem. Svislando etimologie signifas la lando de la Schwyz'anoj.

A.- Post tiu venko de Morgarten nova pakto estis redaktita kaj subskribita en Brunnen, la haveno de Schwyz ĉe la lago, kiu ligas la civitojn. Tiu pakto de Brunnen ne plu estis skribita en la latina lingvo, kiel la du unuaj de 1270 kaj 1291, sed en la germana, por povi esti laŭtlegata komence de ĉiu asembleo de la civitanoj, kiun oni nomis **Landsgemeinde**. Kaj oni ĉesis interesiĝi pri la pakto de 1291, kiun la historiistoj remalkovris nur du jarcentojn poste. La pakto de 1270 neniam estis retrovita.

Cl.- Ĉiu sukcesa ŝtatligo tendencas kreski laŭ du manieroj: per la akcepto de novaj membroj kaj per konkeroj. La urbo Bern, kiel 4 aliaj najbaraj civitoj, kiuj fakte luktis kontraŭ la Schwyz'anoj en 1315 pro obeo al la dukoj de Habsburg, poste alianciĝis kun la 3 arbaraj civitoj Uri, Schwyz kaj Nidwald. Tiel ekde 1353 la Svisa Ligo grupigis 8 ŝtatojn.

A.- Sekvos ekspansia periodo. La urboj Bern kaj Luzern instigos la kamparanojn de la teritorioj de la dukoj de Habsburg ribeli kontraŭ la duka povo. Post la ribeloj la Bern'anoj kaj Luzern'anoj iros helpi la ribelintojn per tre simpla metodo: aneksante iliajn teritoriojn. Tiel Bern kaj Luzern konkeros vastajn teritoriojn. La Schwyz'anoj siaflanke daŭre atakos la monahejon de Einsiedeln kaj la Uri'anoj celos la konkeron de la Tiĉina valo.

Cl.- En la kreskanta Bern'a civito komplika jura sistemo, kiu respektas la komunumajn liberojn, bone difinas ĉies rajtojn. Sed la decidiga regpovo restas en la manoj de kelkaj aristokrataj familioj, kiuj vivas en la urbo Bern. El tiu ĉi urbo la regantaj familioj pli kaj pli gvidas eĉ la tutsvisan politikon. En la propra ŝtato ili elektas estrojn, kiuj loĝas en distriktaĵoj. Ekster la Svisa Ligo ili ambasadoras favore al la tuta Ligo.

A.- Sed la duka familio de Habsburg reagis kontraŭ tiu ekspansio de la Svisa Ligo. En la batalo de Sempach mortas la duko Leopoldo tria de Habsburg, kaj du jarojn poste, lia frato Alberto tria de Habsburg fine agnoskas la juran sendependecon de la Svisa Ligo. Ni estas en 1388.

Cl.- Tiu jaro 1388 povus esti konsiderata, kiel la jura naskiĝo de Svislando.

A.- Kun tiu sendependiĝo komenciĝis grava krizo. Fakte la bezono sin defendi kontraŭ la feŭdaj pretendoj de la duko de Habsburg unuigis la svisojn. Kun la agnosko de ilia sendependiĝo fare de la duka familio fakte malaperas por la svisoj komuna malamiko. Aŭtomate akriĝas la internaj konfliktoj, kiujn kaŭzas la kunekzistado de demokrataj kaj aristokrataj reĝimoj.

Cl.- La demokrataj kamparanoj vidas danĝeron en la aristokratismo, kaj la aristokrataj regfamilioj sentas malestimon por la elektitaj estroj de la kamparanaj civitoj.

A.- En la civito Zug kreskas la rivaleco inter la urbaj regfamilioj kaj la kamparanaj komunumoj. En la aliaj civitoj ĉiuj civitanoj spontane simpatias favore al la samklasanoj. Oni troviĝas antaŭ malfacila elekto: ĉu observi la pakton, kiu malpermesas intervenon en la aferojn de la ceteraj federitaj civitoj? Ĉu obei al la klas-solidareco? Estas granda dilemo!

Cl.- La 22-an de oktobro 1404 Schwyz'a la armeo invadis la urbon Zug. La Schwyz'aj kamparanoj, obeante al siaj klasaj sentoj, venis helpi al la Zug'aj kamparanoj kontraŭ la urbaj regfamilioj.

A.- La reago de la Dieto de la Ligo estis tuja kaj energia. Ĝi restarigis la urban registaron kaj nuligis la apartan ligon inter la civito Schwyz kaj la kamparanaj komunumoj de Zug. En posta fazo per arbitracio juĝistoj malaperigis la konfliktojn dankal juraj decidoj. La tiamaj arbitraciantoj tiel objektivis la konflikto-kaŭzojn, ke ducent-kvindek jarojn poste, okaze de la civila kamparana milito, Zug konos nenian konflikton inter la kamparanoj kaj la urbanoj.

Cl.- La tiam Svisa Ligo de 1404 fakte faris grandan malkovron. Ĝi malkovris, ke federacio povas ekzisti, nur se la diverseco estas akceptata kiel principo kaj idealo.

A.- Ĝi malkovris, ke federismo signifas absolutan rezignon pri la volo al potenco kaj al regado super la ceteraj ligoj, profite al la volo pri solidareco. Tio estas kontraŭstaro al natura determinismo, kiu volas, ke la plej forta regadu super la aliajn.

Cl.- Ni havas tie ĉi la ĝermon de la principo de neŭtraleco.

A.- Konfliktoj inter la kamparanoj kaj la urbaj regfamilioj ankaŭ disvolviĝis ekster la Svisa Ligo. En la orienta parto de la nuna Svislando kamparanoj provis sin liberigi de la regado de la Sankt-Gall'a Abato. En la alianca ĉarto, kiu ligos tiujn ĉi Appenzell'anojn al la svisaj civitoj, oni trovas interesan paragrafon, kiu pruvas, ke la Zug'a konflikto portis fruktojn. Jen tiu ĉi paragrafo:

Cl.- "Ni, Appenzell'anoj, okaze de konflikto en la Ligo, neniam rajtos alporti ian ajn helpon al iu aŭ alia partio, escepte se estas per delegado de civitanoj fake kompetentaj por provi restarigi la konkordon."

A.- Tiu ĉi decido, kiu fakte neŭtraligas la civiton Appenzell, estas unua paŝo al la koncepto pri neŭtraleco.

Cl.- La tiama Svisa Ligo estis organizaĵo tre kompleksa. Se apud la berna urso flirtis la Appenzell'a urso, tio tute ne signifis, ke ambaŭ civitoj havas samajn rajtojn en la Ligo.

A.- Kiel ni jam anoncis pasintsemajne, ni kopiigos sur kasedo nian prelegaron pri la disvolvigo de la nocio de la svisa neŭtraleco. Tiun kasedon interesatoj povos mendi al Svisa Radio Internacia.

Cl.- Claude kaj Andrée GACOND diras al siaj karaj geaŭdantoj: Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*